

## Laste aperis pri terminologio

MÉLANIE MARADAN\*

Ĵus publikiĝis libro, kiu povas helpi al ĉiuj fakuloj kaj scienc-amikoj. Ĝi estas aparte grava nelaste por la verkemuloj de Scienca Revuo. Kion fari, kiam la vortaroj ne plu kapablas helpi onin dum la redaktado de artikolo? Verŝajne ĉiu, kiu iam fake redaktis en Esperanto alfrontis tiun demandon. La libro konkrete respondas tion, sed ne nur. La verko konsistas el diversaj elektitaj publikaĵoj rilate al terminologio ordigitaj en laŭkategoriaj sekcioj. Ĝi estas preskaŭ sendube la plej kompleta verko pri la uzo de Esperanto en faklingvaj kunteksto kaj la historio de terminologia agado en Esperantujo. Ĝi realisme prezentas la estintecon, estantecon kaj estendecon de esperantaj fakaj lingvoj kaj agadoj, kaj ankaŭ detale montras la erarojn de la pasinteco tiel, ke ili ne ripetiĝu. Krome notindas, ke ĝi ankaŭ parte tuŝas la historion de Scienca Revuo kaj de ties asocio per la ĉapitro *Kiam estiĝis ISAE?*. Sed multe pli ol nur tio malkovrinde en la nova trezoro.

La libro aperis okaze de la 80-a naskiĝdatreveno de S-ino Wera Blanke kaj estas ŝia "bilanco", kiel vortumite de la redaktisto, S-ro Detlev Blanke (la edzo de Wera). Ĉu kiel lernilo ĉu kiel helpilo, la verko nepre ĉeestendas sur ĉies librobretaro. Detala recenzo aperos dum la someraj monatoj en la revuo "Esperanto" de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Intertempe, jen konciza skizo de la enhavo:

### Enhav-tabelo de la libro:

- Enkonduka ĉapitro
- Faka apliko kaj terminologio
- La terminologio-scienco kaj lingvonormigo: signifo kaj planlingvaj radikoj
- Principoj de termino-kreado
- Survoje al Terminologia Esperanto-Centro
- Provizora bilanco de TEC kaj iom da perspektivo
- Praktikaj provoj
- Publike paroli
- Recenzoj
- Mallongigoj / Literaturo / Bibliografio de Wera Blanke



\* [maradan@uea.org](mailto:maradan@uea.org)

**Kompleta referenco**

Blanke, W. *Pri terminologia laboro en Esperanto. Elektitaj publikaĵoj.* Red. de D. Blanke. Nov-Jorko: Mondial (2013) 318 paĝoj. ISBN: 9781595692573.

Informcele, la libro jam akireblas, ekzemple rekte ĉe la eldonejo Mondial aŭ el la katalogo de UEA.

*ISAE profitas de la okazo por adresi siajn bondezirojn kaj dankojn al S-ino Wera Blanke, plurfoja verkintino en Scienca Revuo kaj grava motoro de prifaklingva agado en la pasintaj jardekoj.*